

Naskiĝo de la Svisa Federacio,
La paciga rolo de generalo Henri Dufour
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 1991-03-07 kaj 09

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia. Dum la 5 pasintaj elsendoj ni priskribis la interkantonajn konfliktojn, kiujn la antaŭfederacia svisa Dieto ne kapablis arbitracii pro manko de superkantonaj institucioj. Simile al la hodiaŭaj Ĝenerala Asembleo kaj Sekureca Konsilio de Unuiĝinta Naciaro, la svisa Dieto estis senpova okaze de interŝtataj konfliktoj, ĉar tiuj ŝtatoj estis plene suverenaj. Kelkaj havis konservativajn registarojn, dum aliaj reformis sian konstitucion laŭ la principoj de la radikalismo. Kiam la radikalistoj ne povis interveni perleĝe por adoptigi novan konstitucion en konservativaj kantonoj, tiam ili ne hezitis uzi neleĝajn rimedojn. Ili ekzemple kreis armitajn volontularojn, kies celo estis ataki la konservativajn kantonojn. Unu el tiuj armeoj celis la kantonon Lucerno, en la espero faligi ĝian registaron kaj akceptigi novan konstitucion.

A.- La svisa Dieto nur povis konstati la movojn de tiuj armeoj, petante la kantonajn registarojn doni al ili nek armilojn, nek enirpermesojn. Tamen la radikalistaj registaroj armadis, nutris kaj helpis tiujn neoficialajn armeojn.

Cl.- La 30-an de marto 1845 okazis la unua vera batalo en la kantonon Lucerno. La radikalista armeo estis venkita. Ĝi lasis sur la batalkampo pli ol 500 mortintojn kaj la lucerna armeo kaptis pli ol 1'800 soldatojn, kiuj estis malliberigitaj. En la tombejoj de ambaŭ partioj la laŭdoj estis samtonaj : «La volontuloj estas la esprimo de la plej alta moralo kaj de la plej bona popola spirito» asertis la radikalistoj. «La mortintoj estas martiroj de la nacio» eĥis la konservativuloj.

A.- Subite en 1846 sekreta aparta ligo, kiu grupigis konservativajn katolikajn kantonojn en defenda pakto kontraŭ la radikalistaj kantonoj, estis oficiale proklamita okaze de sesio de la frejburga parlamento. Ĝi grupigis 7 katolikajn kantonojn : Lucerno, Uri, Schwytz, Unterwalden, Zug, Frejburgo, Valezo, kaj ekstera Appenzel. Tiu aparta ligo, en la germana lingvo Sonderbund, alportis fine ion, kio mankis en la interkantona konflikto : nomon. Nun la svisaj ŝtatoj, laŭ sia reĝimo, estos por aŭ kontraŭ la aparta ligo. Ekzemple la protestanta konservativa kanton Neuchâtel favoros la sonderbundanojn, dum la katolika radikalista kantonon Tiĉino estos kontraŭ la sonderbundanoj.

Cl.- La politika etoso, kiu regis en Svislando antaŭ 1847 multilate similis al tiu, kiu regas en la hodiaŭa internacia mondo. Tiam mankis al la svisa Ligo intervenkapabla superkantonaj registaro kaj deviga arbitracia tribunalo, kiel nun mankas tiuj instancoj al Unuiĝinta Naciaro. Tial la alfrontado de kontraŭaj ideologiojndukas nerezisteble al kreskantaj miskomprenoj. Ĉio ŝtato rajtas memjuĝi la propran kaŭzon. Ĉiu kantona registaro provis influi la propran publikan opinion favore al sia politiko. Ĉar tiu publika opinio estis ĝenerale dividita en du politikaj tendencoj : revoluciema radikalismo kaj konservativema demokratiismo, estis necese krei popolan unuanimecon per nepolitika rimedo. Tial la registaroj pli kaj pli renaskis la malnovajn religiajn kverelojn.

A.- Oni ricevis la impreson, ke Svislando revenis al la epoko de la religiaj militoj. Tamen la kaŭzoj de la disputemo restis profunde politikaj. La celo de la sekreta pakto Sonderbund estis ebligi al sep registaroj konservativaj armitan defendon kontraŭ la radikalista revolucio, kiu havis simpatiantojn eĉ en la konservativaj teritorioj. Por malfortikigi tiujn opoziciulojn, oni

prezentis ilin kiel detruantojn de la katolika fido. La registaro de la ŝtato Neuchâtel, kiu estis samtempe kantono kaj princlando regata de la reĝo de Pruslando, siaflanke kredigis al la loĝantaro, ke la radikalistoj endanĝerigas la protestantismon.

Cl.- Sed en la katolikaj kaj protestantaj kantonoj kun radikalista konstitucio oni vivis en tute alia etoso. Tie la publika opinio emis pardoni al la revoluciuloj la atencojn kontraŭ la leĝoj, dum tion ili ne pardonis al la konservativaj registaroj. La publika opinio ĉiam facile pardonas al revoluciuloj agojn kontraŭleĝajn, kiujn ĝi trovas nepravigeblaj ĉe registaroj. Pro tio la simpatio al la radikalistaj armeoj kaj malŝatego al la sonderbundaj registaroj kreskis monaton post monato. Tiu simpatio al la radikalistoj esprimiĝis dum kantonaj balotoj. Ĉiam la radikalista tendenco venkis super la konservativa. Unu jaron post la malkovro de la sonderbunda pakto ekzistis pro tio radikalista plimulto en la svisa Dieto.

A.- Dankal tio, por la unua fojo, tiu senpova Dieto posedis voĉdonan plimulton. Ĝi kunsidis en julio 1847 en la urbo Bern. Ĝin malfermante la prezidanto de la berna registaro, en tre digna parolado, alvokis la registarajn delegitojn al repaciĝo. Tiu alvoko restis vana.

Cl.- La sonderbundaj registaroj rifuzis ĉian arbitraciaron. Tiam la Dieto proklamis la apartan pakton Sonderbund kontraŭa al la Pakto de 1815. La aparta Ligo estis proklamita malfondita. Tiu dieta decido estis leĝa. Tamen la sonderbundaj registaroj rifuzis obei al ĝi.

A.- La dieta kunsido estis interrompita dum du monatoj por doni tempon al la sonderbundaj registaroj por reveni al politiko pli konforma al la dieta decido. Sed la sonderbundaj registaroj rifuzis revizii sian politikon.

Cl.- Tiam la Dieto decidis varbi federacian armeon kvindek milsoldatan. La ĝeneva kolonelo Henri Dufour estis elektita generalo. Bernhard Meyer, reprezentanto de la sonderbunda tendenco, legis proklamon. Li havis larmojn en la okuloj. Levante la brakojn ĉielen kaj prenante Dion kiel atestanton, li avertis, ke se okazos interkantona milito, la sonderbundanoj neniel kulpos. Post tiu solena averto la sonderbundaj delegitoj forlasis la dietan kunsidejon.

A.- Se ili volis venki, la sonderbundaj kantonoj devis tuj agi, antaŭ ol generalo Henri Dufour estos havinta la tempon planadi sian kampanjon. Tial jam la postan semajnon la sonderbundaj armeoj komencis ataki du kantonojn: Aargau kaj Tiĉino. La postan tagon, la 4-an de novembro 1847, la Dieto ordonis al generalo Henri Dufour perforte obeigi la sonderbundajn registarojn.

Cl.- Antaŭ ol ekagi, generalo Dufour faris solenan proklamon, en kiu li admonas la soldatojn eviti ĉian absolute ne necesan perforton. Tiu rekomendo estas antaŭsigno de la principoj de Ruĝa Kruco fondota en Ĝenevo en 1864, do 16 jarojn pli poste. Pro sia altnivela moralo kristandevena, tiu rekomendo influis ne nur la federacian armeon, sed ankaŭ la agojn de sonderbundanoj. Jen kelkaj citaĵoj:

A.- «Mi metas sub vian prrotektadon la infanojn, virinojn, oldulojn kaj pastrojn.»

Cl.- «Kiu atakas nearmitan personon, tiu malhonorigas kaj makulas sian flagon.»

A.- «La militkaptitoj kaj vunditoj meritas vian respektemon kaj kompaton...»

Cl.- Generalo Henri Dufour estis kompreninta, ke ĉiu mortigo vekas venĝemon. La starigo de nova konstitucio ne povos sin bazi sur perforto kaj venĝemo, sed nur sur reala repaciĝo, sur ambaŭflanka venko kontraŭ la milit-spirito. Pro tio li evitis la alfrontadon kun la malamika armeo kaj estis tre severa kontraŭ la subuloj, kiuj estis senpaciencaj por ataki la malamikon. Li volis kontroli ĉian kampanjon kaj konsideris sian agadon pli kiel polican kampanjon, ol kiel militan konkeron.

A.- Dankal tiu taktiko de la sonderbunda milito, kiu estus povinta eksplodigi la landon, finiĝis jam post unu monato. Ĝi estis kaŭzinta entute nur 104 mortintojn kaj 374 vunditojn kaj nova konstitucio federacitipa estis subskribota.

Cl.- Tio vige impresis ambaŭ partiojn. Generalo Henri Dufour ne venkis per la forto de la armiloj, sed per sia konvinko, ke ĉia milito estas evitinda plago. Li akiris grandan moralan prestiĝon ne nur en Svislando mem, sed ankaŭ ĉe la registaroj de la aliaj eŭropaj landoj, kiuj estis pretaj interveni en la svisajn aferojn por la propra profito. Tio favoris kelkajn jarojn poste la kunvokon de internacia konferenco interregistara por la subskribo de la Ĝeneva Konvencio, kiu difinis la principojn de vla Ruĝa Kruco.

A.- Generalo Henri Dufour estas unu el tiuj inspirantoj de la ĝeneva spirito, kiu rigardigos al Svislando, kiel al pacorganiza lando.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND pretas sendi la tekston de sia prelegaro pri la formiĝo de la Svisa Federacio al la geaŭdantoj, kiuj petos ĝin skribe. Ĝis reaŭdo !